

La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

Nro 2/1987 ★ Kr 8,50

Parlamenta apoggrupo nun kreita en Svedio



*Jen kelkaj fotoj de la historia tago, la 3-an
de februaro, en la Parlamenta domo.*

Fotis Bernt Lindquist

Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro,
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm,
Telefon: 08-11 74 34.

EsperantoCentro är öppet
måndag-torsdag kl. 17-19.
Postgiro: 20 12-3, Esperanto-
förbundet.

Medlemsavgift:

Direktansluten medlem 100 kr
Familjemedlem (utan tidn.) 50 kr

Ungdomsmedlem 50 kr

Prenumerationsavgift för *La Espero*
ingår i medlemsavgiften.

Medlemmar under 30 år är samtidigt
medlemmar i Sveriges Esperantisters
Ungdomsförbund och får dess tidning
Kvinpinto. Om du inte får den, med-
dela födelseår till EsperantoCentro.

Esperantoförlaget

Postadress:

Box 7502, 200 42 Malmö.

Besöksadress:

Möllevångsgatan 20 B.

Öppettider: 1 sept.-15 maj:

onsdagar 10-11, torsdagar 17-18.

Skriftliga beställningar expedieras
hela året, även under sommaren.

Telefon: 040-12 20 29.

Postgiro: 578-5.

Expedition: Wivi Nilsson.

Styrelsens ordförande:

Anita Lindblom.

La Espero

Organ för Svenska Esperantoför-
bundet

Adress: EsperantoCentro
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm tel
08-11 74 34

Ansvarig utgivare: Bertil Åkerberg

Redaktör: Karin Lindquist
Västermov. 19, 732 00 Arboga
tel 0589-155 31

Utförning: Bertil Danielsson,
Prästgårdsv. 8, 672 00 Årjäng
tel 0573-105 69

Fotosats och tryck:

EsperantoCentro, Stockholm 1986



SEF:s styrelse

Ordförande: Karin Lindquist (La Es-
pero massmedia)

Västermov. 19, 732 00 Arboga,
tel 0589-155 31.

Sekreterare: Anita Lindblom

(kansliet, medlemsfrågor)

Mariehamngatan 18

163 27 Spånga

Tel 08-751 73 79

Kassör: Börje Andersson (massmedia)

Ingeg. 4 A, 541 50 Skövde

tel 0500-122 05

Vice ordförande: Märtha

Andréasson. (SEF-årskongresser)

PI 2265, 425 00 Hisings Kärra

tel 031-57 11 33

Styrelseledamot: Kerstin Rohdin

(turnéer, bibliotek)

Ringv. 11 B, 579 00 Högsby

tel 0491-204 61

Styrelseledamot: Åke Robdin (utred-
ningar)

Engelbrektsg. 25 A, 702 13 Örebro,
tel 019-18 53 60

Styrelseledamot: Haldo Vedin (utveck-
ling)

Jordbrogatan 57

603 64 Norrköping

tel 011-16 26 87

Suppleant: Ingemar Nordin (kans-
liet).

Mosebacke torg 8, 116 46 Stockholm,

tel 08-41 46 37

Suppleant: Bertil Andreasson

(utbildning, nordiskt samarbete)

Södra Rörum, 242 00 Hörby

tel 0415-501 52

Informationskommittén: Bernt

Lindquist

Västermov. 19, 732 00 Arboga tel

0589-155 31

La Espero

Utgivningsplan för 1987

Nr 1 10 febr (man.stopp 10 jan)

Nr 2 31 mars (manusstopp 15
febr)

Nr 3-4 31 maj (manusstopp 15
april)

Nr 5 31 juli (manusstopp 15 juni)

Nr 6-7 30 sept (manusstopp 15
aug)

Nr 8 30 nov (manusstopp 15 okt)

Manuskripten skall sändas till
redaktören, Västermovägen 19,
732 00 Arboga. Dessa skall vara
maskinskrivna med dubbelt rad-
avstånd, inga förkortningar och
bokstäverna skall vara rätt över-
tecknade. Manuskripten skall va-
ra av en sådan kvalitet att en icke-
esperantist direkt skall kunna sät-
ta dem.

Annonspriser i La Espero

1/1-sida kronor 1.200

1/2-sida kronor 725

1/4 sida kronor 425

2 spalter x 6 cm kronor 250

Ĉu vi notis...

...ke la Sveda Esperanto Jubilea
Kongreso okazos la 10. - 13. de
aprilo en la Parlamenta Domo en
Stokholmo (eble okazis kiam vi le-
gas tiun!)

...ke La Internacia Kurso en es-
peranto okazos la 9. - 13. de junio
en Kungälv

...ke la esperanta ekzameno oka-
zos la 26. de aprilo

...ke la Esperanto Tago okazos la
5-an de septembro kün la semajno
antaŭe aŭ poste

...ke la Internacia Esperanto
Kongreso okazos en Varsovio inter
la 25. juio - 1. aŭgusto

...ke estas nepre tempo aboni es-
perantajn gazetojn nun

...ke estas urga tempo pagi niajn
membrajn kotizojn al SEF kaj UEA

Pri aliĝadreso kaj kotizoj vidu en
la antaŭaj numeroj de La Espero

Prezidanto:

Esperanto Tago

Esperanto Tago ĉijare kaj daŭre okazos la unuan sabaton en septembro kun la semajno antaŭe aŭ poste laŭ via propra decido.

Kelkaj kluboj kaj unuopaj esperantistoj plendis pri la loko de la Tago en fino de septembro, ĉar tiam ili ne povas utiligi ĝin antaŭ la kursstarto. La estraro, kiu havas saman opinion, decidis ŝanĝi la tempon. La tago nun okazos ĉijare sabate la 5. de septembro kun semajno antaŭe aŭ poste.

Pripensu ke estas jubilea jaro. Estas nun kiam ni devas montri ke esperanto vere vivegas kaj antaŭenmarŝas.

Ĉiu klubo devas vere streĉi la fortojn ĉijare – aranĝu ekspoziciojn, prelegojn (uzu la bildben-



don – pruntu ĉe EC se vi ne aĉetis), akceptu la eksterlandajn prelegantojn, varbu esperantoopogantojn, aranĝi kursojn por komencantoj kaj daŭrigantoj, provu sendi programojn pere de proksimradio (ni havas nun sonbendon kun informo pri esperanto – demandu ĉe EC)...

Estas nia ĉefa okupo instrui esperanton kaj informi pri ĝi.

Ĉu vi memoras ke nia moto estas ke ĉiu svedo sciuj pri esperanto antaŭ la jubilea jaro. Ni ne atingis tiun celon, bedaŭrinde – tamen mi kredas ke la aro sciante pri esperanto kreskis dum la jaro. Sed se ni uzu ankaŭ tiun ĉi jaron por



informi pri la lingvo ni certe ĉe la jarfino, povas diri ke ni estas ĉe la celo.

Karin Lindquist

Esperanto-linio en Karlskoga Popolaltlernejo

Por la unua fojo en sveda esperanto-historio oni havos esperanto-linion en popolaltlernejo (vidu la anoncon en la gazeto). Estas ege grave ke tiuj kursoj vere okazos.

Por prilabori la lernejojn enkonduki esperanton, estas devigate ke ni havas esperantajn instruistojn. Nun estos ebleco havigi tiujn!

Pro tio ni devas, ĉiujn esperantistojn, informi pri la kursoj en Karlskoga. Ĉu vi konas taŭgajn, motivigitajn personojn, persvadu ŝin/lin partopreni!

Laboru por ke la kursoj vere okazu.

Karin Lindquist

Parlamentara apogogrupo en Svedio

La 3-an de februaro kolektiĝis 13 parlamentanoj kaj 6 esperantistoj kun Ingemund Bengtsson en la pinto en la konferenca ĉambro de la sveda parlamenta prezidanto, cele doni kaj ricevi informadon pri esperanto.

La antaŭlaboro komenciĝis jam antaŭ unu jaro, kiam ni instigis la klubojn intense prilabori siajn regionajn parlamentanojn. Kelkaj kluboj ankaŭ faris laŭdindan laboron.

Ni invitis tiujn "prilaboritajn" parlamentanojn kaj tiujn, kiuj subskribis "uppropet" – entute 38. 13 akceptis. La aliaj telefone aŭ skribe bedaŭris ke ili, pro aliaj taskoj, ne havis okazon veni.

Do, ni kolektiĝis la 3-an de februaro je la 17a horo en la konferenca ĉambro de Ingemund Bengtsson – 13 parlamentanoj:

Bengt Göransson, kulturministro, Farsta

Lars Ernestam, Örebro
Evert Svensson, Kungälv

Ingrid Hasselström–Nyvall,
Nybro

Karl-Erik Svartberg, Partille,
prez. de Sveda UN

Gösta Andersson, Nybro
Oskar Lindqvist, Vällingby
Berit Löfstedt, Ljungsbro

Viola Furubjelke, Söderköping
Per-Olof Strindberg, Linköping
Marianne Karlsson, Skänninge

Mona Saint Cyr, Kisa
Inge Carlsson, Finspång

kaj 6 esperantistoj:

Ingemund Bengtsson
Christer Kiselman
Ingemar Nordin
Anita Lindblom
Bernt Lindquist
Karin Lindquist

Ingemund Bengtsson prezentis la programon kaj rakontis pri siaj kontaktoj kun esperanto, en- kaj eksterlande.

Mi informis pri agado por esperanto de parlamentanoj en aliaj landoj, kiamaniere ili apogas esperanton, ekonomie kaj morale. Ili ankaŭ ricevis superrigardon de la esperanta lerneja situacio.

La informojn ili ankaŭ ricevis skribe. Fine mi prezentis tre deziratajn donacojn de la Sveda Parlamento okaze de la centjara jubileo:

1. ke ili starigu parlamentan grupon apogantan esperanton

2. ke la parlamentanoj laboru por enkonduki esperanton en la lernejoj kiel C-lingvo

3. ke oni ŝanĝu la ŝtata kontribusistemo tiamaniere ke ankaŭ organizoj kiel nia ricevu monhelpon.

Christer Kiselman donis superrigardon de esperanto kun scienca "tuŝo". Li menciis ankaŭ la favoran opinion de Olof Palme koncerne esperanton kaj ĝian pacgardantan taskon.

Vigle la parlamentanoj volis scii plu pri la lingvo kaj Ingemar Nordin rakontis kiel bona helpilo esperanto estas dum kunvenoj de Freinet-movado, kiam instruistoj el multaj landoj kunvenas kaj ne bezonas interpretistojn.

Al la demando pri kiom ni estas kaj kiom lernas esperanton nuntempe, Anita Lindblom respondis ke oni povas kalkuli laŭ venditaj lernolibroj, kaj prezentis la aktualajn nombrojn.

Ili ankaŭ espirmis sian dubon ke lernantoj elektas esperanton kiel C-lingvo pro mankanta merkata valoro. Bernt Lindquist menciis la konstantan prilaboron de internaciaj organizoj, de ĉiuj niveloj, akcepti esperanton kiel siaj laborlingvoj – el kiuj UNESKO, UN, EM, Europa-konsilantaro kaj Internacia Socialisma Unuiĝo montris intereson por esperanto. La tago kiam unu el tiuj organizoj elektos esperanton kiel sian laborlingvon, la bezono de esperantoedukado tre rapide kreskos.

Kiel fino de tiu unua parto mi demandis ĉu ili estas preta eniri esperantan apoggrupon. Ili jesis kun pli malpli fortaj voĉoj kaj Ingemund Bengtsson konfirmis kun manbateto.

Ingemund Bengtsson regalis ĉiujn partoprenantojn per bongusta supeo en sia propra manĝoĉambro en la Parlamenta Domo kaj dume regis tre vigla kaj amuza atmosfero.

Do estas fakto ke ni nun ankaŭ en Svedio havas parlamentanojn kiuj apogas nin. Ĉu tiu grupo kreskos dependas de ni en la estraro de SEF, sed plej parte de vi en la kluboj, ĉu vi povos prilabori niajn regionajn parlamentanojn!

Karin Lindquist



Esperanto fariĝas centjara



La Jubilea Jaro longe atendata nun staras antaŭ ni: Esperanto fariĝas centjara. Ke ĝi plene maturiĝis, tio estas evidenta jam delonge. Ne plu oni povas nomi Esperanton interesa eksperimento; ne plu oni povas priskribi nian lingvon kiel ambician provon al internacia kompreniĝo. Hodiaŭ Esperanto jam pruvis sian taŭgecon en ĉiuj medioj, kaj estas nenio tro komplika, nenio tro subtila — se entute ĝi estas lingve esprimibla — kiu ne povas esti esprimita en la Internacia Lingvo. Kiel lingvo Esperanto plene sukcesis.

Ankoraŭ ne plene sukcesa estas la disvatigo de tiu lingve sukcesa fenomeno. La granda plimulto de la homaro neniam aŭdis pri Esperanto. Inter tiuj, kiuj scias, kio ĝi estas, ekzistas multaj homoj, kiuj ne plene komprenas ĝian grandan kapablon aŭ dubas pri la asertoj kaj pretendoj de tiuj, kiuj konas ĝin pli bone. Necesas dum la Jubilea Jaro atingi tiujn homojn, kiuj nenion scias pri Esperanto, kaj konvinki ilin lerni la lingvon. Necesas atingi ankaŭ la skeptikulojn por forigi ilian skeptikecon. Necesas, entute, sukcesigi ne nur la lingvon sed ankaŭ la movadon por disvastigi tiun lingvon.

Okazoj tiel bonaj kiel la Jubileo ja venas malofte: necesas, ke ĉiu parolanto kaj uzanto de Esperanto streĉu sin ĝis maksimumo dum la Jubilea Jaro. Kion ni povas fari?

- Unue, ni povas instrui la lingvon, ekzemple per starigo de loka kurso, aŭ ni povas helpi aliajn tion fari.

- Due, ni povas verki artikolon aŭ artikolojn pri la lingvo kaj proponi ilin al loka aŭ nacia ĵurnalo aŭ gazeto.

- Trie, ni povas atentigi niajn amikojn kaj kolegojn pri Esperanto kaj ĝiaj atingoj, kaj klopodi konvinki ilin esplori ĝin pli profunde.

- Kvare, ni povas kunlabori en alia agado, loka aŭ nacia, por informi la publikon pri Esperanto.

- Kvine, ni povas subteni la Esperanto-movadon per aĉeto de libroj, per partopreno en kongresoj kaj konferencoj, kaj per financaj kontribuadoj al lokaj, naciaj aŭ internaciaj Esperanto-organizaĵoj.

Efika informado pri Esperanto postulas efikan informiĝon: ni devas mem koni nian lingvon kaj nian movadon. Necesas prezenti la faktojn, klare kaj sen troigo aŭ subtakso. Necesas zorge kaj saĝe esprimi la argumentojn por Esperanto. Do, la unua neceso, se

ni volas klerigi la publikon, estas klerigi nin mem. Kaj kiam ni elpaŝos por montri Esperanton al la publiko, ni povos apogi nin sur la jamaj atingoj de la Esperanto-movado, sur la rekono, kiun ĝi jam ricevis ĉe Unesko kaj aliaj internaciaj organizaĵoj, kaj sur la personaj spertoj de miloj da esperantistoj, kiuj profitis spirite, kulture, intelekto el sia utiligo de la Internacia Lingvo.

Fine, se ni deziras, ke nia lingvo de la paco efektive kreu pli pacan mondon, ni devas mem praktiki la pacon: nia lingvo plej rapide progresos se inter ni ni harmonie kunlaboros, kaj ĉiuj ligos inter si la manojn por komuna agado en la Jubilea Jaro.

Humphrey Tonkin



La esperanto historio en sveda



Okaze de la 100-jara jubileo SEF eldonas libreton pri la historio de esperanto, en- kaj eksterlande, en la sveda lingvo. La intenco estas ke la libroj estos sendata al inter alie la bibliotekoj, al specialaj gazetoj kaj al lingvointeresuloj. Kompreneble ni esperas ke la kluboj kaj unuopaj esperantistoj aĉetos kaj disdonos al konvenaj instancoj - lernejoj, popolattlerne-

joj, institucioj diversspecaj, konatuloj...

La kunmetadon faris Jan Ströner kaj Roland Lindblom skribis la antaŭparolon.

La libro kostas por ekz. kr 7:- kaj por 10 ekz 50kr

Aldone sendkosto

Mendu ĉe Esperanto Centro, Brunnsgratan 21. 111 38 Stockholm, pĝ 20 12 - 3.

La Sveda Parlamento en esperanto

Nun vi povas legi pri La Sveda Parlamento en esperanto. Antaŭe la libro estis eldonita krom en la sveda lingvo ankaŭ en angla, germana kaj franca kaj do nun ankaŭ en esperanto.

La libreto (31 paĝoj) priskribas la historion de La Sveda Parlamento ekde 1435 ĝis niaj tagoj. "Elektio al la Parlamento", "Kiu rajtas voĉdoni?", "Kion faras la Parlamento", "Kiu rajtas paroli kaj kiom longe?" estas kelkaj rubrikoj. Tre interesa legado!

Kiam mi demandis Ingemund Bengtsson, la prezidanto de la Sveda Parlamento, dum nia jar-kongreso en Helsingborg 1985, ĉu estas eble eldoni la libron en esperanto, li tuj respondis "Venu kun la traduko, mi poste aranĝos la tuton"! Kun helpo de kelkaj membroj ni povis liveri la tradukadon sufiĉe rapide. Kaj nun ĝi estas pretita. Kaj SEF kore dankas Ingemund Bengtsson kaj la Svedan Parlamenton pro la valora libreto.

Ĉiuj partoprenantoj de la kongreso ricevos la valoran libreton

Vi povas mendi la libreton post la 15-an de aprilo ĉe:

Sveriges Riksdag
Tryckeriexp.
100 12 Stockholm
Karin Lindquist

Kongressdeltagare se hit!

Glöm inte att besöka Postmuseets utställning om esperantofilateli. Det är Anna-Greta Strönnens fina samling som visas.

Museet har också ordnat en särskild minnesstämpel, med vilken du kan stämpla dina kort eller brev.

Museet har öppet alla dagar mellan kl 11-15 utom måndagar och det ligger på Lilla Nygatan 6 i närheten av "kongresejo".

Jubileaj poŝtkartoj

Sendu jubileajn poŝtkartojn al viaj geamikoj!

Sur la adresfanko estas bildo de la unua lernolibro kaj sur la alia estas bildo de L.L. Zamenhof kaj kun spaco skribi kelkajn salutvortojn.

Dum la kongresaj tagoj en Stockholm estas eble ricevi aŭ specialen jubilean poŝtstampon de SEF aŭ la poŝtstampon de la Poŝta Muzeo (vidu la bildojn).

La poŝtkartoj estas/estos pretaj c. la 1:a de aprilo kaj se vi volas ŝpari tempon dum la kongresaj tagoj, mendu tuj kaj skribu hejme.

La kartoj kostas po 2:- kr + sendkosto

Mendu ĉe Esperanto Centro, Brunnsgratan 21. 111 38 Stockholm pĝ 20 12 - 3



... novaĵoj ...

Ne forgesu aĉeti la jubileajn glu- markojn

Prezo por folio kun 16 pecoj estas 8 kr, lo folioj 70 kr + send-kosto 2.50 kr.

pg 481 43 95 - 2, SEF-jarkongreso c/o Lundkvist, Hägersten.

Visa att det finns esperantister — bär det nya "föreningsmärket"

Bär det nya föreningsmärket när du representerar esperanto — och det gör du alltid, eller hur?

Märket är ca 45 x 35 mm ovalt, med ljusbeige botten och symbolen i grönt och svart.

Märket kostar kr 20:— för 1 st och 17:— per st för köp av 10 st. Klubbar rekommenderas att köpa för försäljning till sina medlemmar. Portokostnader tillkommer. Beställ hos Esperanto Centro, Brunnsgratan 21, 111 38 Stockholm, pg 20 12-3.

KARLSKOGA FOLKHÖGSKOLA

Esperanto-linjen 1987/88

8-veckorskurser med start

31/8 och 11/1 (nybörjarkurser)

26/10 och 14/3 (fortsättningskurser)

Undervisningen omfattar minst 25 veckotimmar. I kurserna ingår förutom esperanto t ex internationella utblickar och estetisk verksamhet.

Moderna kurslokaler, inlärningsstudio, trevliga elevbostäder och vackra omgivningar.

Du som är esperantist!

Sprid information om dessa kurser till vänner och bekanta.

Upplysningar lämnas av Karlskoga Folkhögskola, 691 24 Karlskoga, tel. 0586-503 60 vx.

Sommarkurs i esperanto på Karlskoga folkhögskola

27/6-3/7 1987

Nybörjar- och fortsättningskurser

Vi välkomnar internationellt deltagande.

Studier, utflykter, samkväm.

Upplysningar lämnas av Karlskoga Folkhögskola 691 24 Karlskoga, tel. 0586-503 60 vx

TRA LA LANDO

Nordokcidenta regiono

Sukceso en Karlskoga!

La aranĝo, kiun Karlskoga Popolaltlernejo okazigis kunlabore kun la TEDU-regiono la lastan semajnfino en januaro, fariĝis vera sukceso. Kvankam estis severa vintra vetero venis ĉ. 50 personoj, ankaŭ ekster nia regiono kiel el Uppsala kaj Göteborg, por partopreni en unu el la tri studgrupoj aŭ la diskutgrupo. Ankaŭ estis infangrupo kun partoprenantoj 10-12 jaraj. Tre ĝojiga afero estis ke la plej granda grupo estis tiu kun komencantoj, Pluraj el la, tieaj partoprenantoj studis iomete

la korespondan kurson, nun ili havis eblecon pli praktiki la lingvon sub lerta kaj instiga gvido de Lars Forsman, instruisto je la popolaltlernejo. La daŭrigan kurson entuziasme gvidis Iva Åberg, la plej altan lerte kaj fervore gvidis Sven Jonsson el Uppsala. Haldo Vedin kaj Bertil Nilsson respondecis pri la diskutgrupo, kiu okupis sin pri la estonta laboro de la sveda esperantomovado. La infanoj estis tre kontentaj pri la semajnfino, dum kiu ili lernis vortojn kaj frazojn en esperanto, ludis per esperanto-

ludiloj (domino, memoro) sed ankaŭ lernis plekti, faldi paperojn (origamio) — Berit Posthuma meritas laŭdojn pro sia bona prizorgo de la infanoj.

Laŭdojn ni cetere ricevis amase! Dank' al zorgema antaŭpreparo fare de Lars Forsman ĉio iris tre glate kaj multaj grandaj kaj malgrandaj okazaĵoj kontribuis al la sukceso. Feliĉe por ni esperantistoj estas ke ankaŭ la est-

raro de la popolaltlernejo estas tre favora al la instruado de esperanto ĉe la lernejo. Jam nun Lars instruas ĉ. 20 lernantojn en la lernejo — ene de la ordinara vintra programo! Krome li havas grupon kiu studas vespere. Same kiel pasintjare li planas someran kurson, ĉijare almenaŭ en du niveloj. La kurso okazos 27/6 — 3/7 1987 kaj mi vere admonas vin ĉiujn konigi al viaj lernantoj la eblecon studi dum unu semajno en tiu lernejo kiu havas rimedojn kaj eblecojn fariĝi nova sveda esperanto studcentro! Karlskoga Popolaltlernejo vere havas tiun ambicion, kaj aperigos ĉijare anoncojn ankaŭ en eksterlandaj esperantogazetoj por havi pli internacian partoprenantaron.

La lernejo bonege taŭgas por tiaj internaciaj kursoj. Ĝi situas tre bele apud la lago Möckeln, la dometoj en kiuj ni loĝas estas tute modernaj, ĉiuj ĉambroj havas necesojn kaj duŝon, kaj la ĉefdomo kun studĉambroj estas eksterordinare bela kaj komforta. Krome la manĝaĵoj estas bongustaj kaj malvarmaj kaj la prezoj tute moderaj.

Do, mi aŭdacas diri ke la sveda esperantomovado nun havas favoran eblecon eniri novan epokon rilate la instruadon de esperanto. Mi esperas ke vi ĉiuj sentas vian respondecon kapti ĉiujn eblecon kaj faros vian eblon diskonigi ĉiujn eblecojn studi esperanton.

Gunilla Sundholm

Okcidenta regiono

En Skövde estas tre vigla esperantolaboro. Oni havas kursojn en diversaj niveloj, planas por vizito de Anita kaj Eva el Pollando, ekskursoj en la ĉirkaŭaĵoj kaj nova loterio en la OBS-magazeno. Bona klubagado kun diversspecaj prelegoj aŭ programoj.

Falköping havas studrondon

kaj ankaŭ daŭrigas la radiajn elsendadojn.

Borås aranĝas studrondojn kaj klubkunvenojn.

Ankaŭ en Alingsås estas studrondo kaj oni aranĝas klubkunvenojn regule.

Lidköping preskaŭ ne havis esperantoagadon. Ĉijare oni tamen planas vigligi la kluban aktivecon denove.

Göteborg havas 6 diversajn kursojn, oni planas havi ekspoziciojn dufoje en la urba informejo-/Informationscentralen/, dum la Semajno de Internacia Amikeco kaj aŭtune antaŭ la studperiodo. Ambaŭ kluboj havas krom studrondojn ankaŭ regulajn klubkunvenojn kun diversspecaj prelegoj aŭ aliaj programoj. Estas planoj pri radia kurso en la Radio Angered, informprogramo ĉiusemajna jam komencis.

Kungälv havas studrondojn kaj planas diversajn kunsidojn kunprelegoj de eksterlandaj esperantistoj. Helpis organizi la kurssemajnon en Nordiska Folkhögskolan en junio. Interŝanĝas vizitojn kun Internacia Esperanto Kursejo en Bulgario. Planas publikajn kunsidojn dum la kurssemajno por festi la 100-jaran jubileon de esperanto.

Märtha Andreasson

Många intresserade av kursen i Kungälv

Information i korthet. Det förefaller vara mycket stort intresse för kursen. Det har redan anmält sig ganska många och ännu fler har ringt och anmält intresse.

Vi hoppas att vi inte ska behöva avvisa några, men vi har bara fått ett begränsat antal platser. Därför, vill du vara säker på att komma med, så anmäl dig genast.Utförligare information fanns införd i förra numret av La Espero.

Upplysningar hos Märtha Andreasson, tel. 031-57 11 33.

Suda regiono

Södra Distriktet

anordnar veckoslutskurs 13-14 juni på Gullbrannagården strax söder om Halmstad. Det kommer att bli grupper för nybörjare och mera avancerade samt i allmän språkvetenskap. Lärare blir bl a Anna-Maria Lange och Iva Åberg. Närmare upplysningar lämnas av Lisbet Andreasson, tel. 0415-501 52.

TEDU-regiono

Esperantostipendier i Motala

I år firar esperantorörelsen 100 år. Motala esperantoklubb uppmärksammar jubileet genom att anslå 2 000 kr i stipendium till ungdomar för deltagande i jubileumskongresser i Stockholm och Warszawa. Dessutom 1 000 kr för deltagande i en internationell sommarfolkhögskola.

Beslutet om stipendierna fattades vid klubbens årsmöte som i veckohelgen hölls i Dubergska gården. Vid mötet omvaldes styrelsen med Ulf Ribers som ordförande.

Motala esperantoklubb har under året undervisat i esperanto i Hällaskolan, Borensberg, med 17 elever och med Gunilla Tyberg som handledare. Nu beslutade man sig för att också hålla en esperantokurs under sportlovsveckan.

Klubben har ingått som delägare i bokförlaget Progreso Eldonejo och har vidare drivit en radiokurs i språket esperanto med Karl

Blomkvist och Mags Enström som ledare.

Efter årsmötesförhandlingarna talade Karl Blomkvist om hur man under 300 år försökt lösa problemet med ett internationellt hjälpspråk.

Vigla jaro en Skövde

Klubo Esperantista en Skövde havis tre viglan jaron laŭ la jar-raporto prezentita dum la jarkunveno. Dum 17 renkontiĝoj estis tre varia programo: Prelegoj de gastoj el Pollando, Britujo, Francujo kaj Hungarujo, prelegoj de membroj pri eksterlandaj vojaĝoj, debatoj, studvespero pri komputiloj, vizito ĉe la Proksimradio ktp. Krome estis ekskursoj en la provinco.

Je la jarŝanĝo la klubo havis 54 pagantajn membrojn sed poste ricevis dekon da novaj dank al komencaj kursoj. La klubo donis helpon al esperantistoj en Nikaragio kaj Argentino.

Gunnar Olsson estas reelektita prezidanto, kaj la ceteraj en la estraro estas Solveig Bertilsson, Sten Broman, Kurt Frisk, Bertil Johansson, Gunilla Björkman, kaj Inger Sjöberg.

La klubo ekonomio estas tre bona dank al la bona organizado de loterioj fare de Gunnar Mattsson.

B.A.

Stipendier att söka

Du, som vill vara med i en kurs i Esperanto, har nu möjlighet att söka stipendier. Det gäller framför allt ungdomar, men det kan utgå även till äldre.

Svenska Esperantoinstitutet utlyser 3 st stipendier på 300 kr vardera.

Gustafsbergsföreningen i Uddevala lämnar stipendium för esperantoutbildning till (enligt reglerna) "i Bohuslän uppvuxna, behövan-

Bli medlem i ILEI

I.L.E.I. (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) är en världsomspännande organisation för lärare, kursledare och sympatisörer. ILEI har ett nära samarbete med UEA och ansvarar nu för undervisning och skolkontakter inom Esperantovärlden. ILEI har konsultativ status hos UNESCO, kategori C.

ILEI har sektioner i många länder.

ILEI ger ut en egen tidning, Internacia Pedagogia Revuo (IPR) tre gånger om året. Svenska sektionen sänder ut ett antal cirkulär till medlemmarna.

ILEI anordnar internationella konferenser varje år. 1986 hölls den 20:e konferensen i Belgien. 1987 anordnas den 21:a i Lodz, Polen, strax före jubileumskongressen.

ILEI anordnar kurser och pedagogisk examination.

ILEI:s styrelse: Prof. Istvan Szerdahelyi, Ungern ordf., Edward Symoens, Belgien, v. ordf., Catina Dazzini, Italien gen.sekr., Marin Bacev, Bulgarien, v. sekr., Bertil Andreasson, Sverige kassör.

Medlemsavgiften är 60:-/år, varav 40:-, går till huvudorganisationen och resten till svenska sektionen.

Vill Du bli medlem?

Vänd dig då till svenska sektionens ordf. Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, 242 00 HÖRBY eller sätt in medlemsavgiften på postgiro 3 14 30-2 Svenska Lärares Esperantoförbund. Välkommen!

ILEI kongressos en Lodz

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj okazigos sian 21-an Internacian Konferencon, 17. - 24. julio 1987, Lodza Universitato. Kadrotemo de la konferenco: "La scienca esplorado de Esperanto el pedagogia kaj lingvopolitika vidpunkto".

La programo de la konferenco konstistos el:

- sciencaj-pedagogiaj, didaktikaj, metodikaj - prelegoj kaj seminarioj,

de och skötsamma ungdomar, såväl pojkar som flickor".

Enligt uppgift kan det utgå även om man bor på annan plats i landet numera, men är uppvuxen i Bohuslän.

Det är en speciell summa som utdelas per år, storleken på stipendiet till var och en beror på antalet sökande.

Ytterligare upplysningar hos Ebbe Vilborg, tel 031-40 52 74 el Märtha Andreasson, tel 031-57 11 33.

- organiza diskutoj, diversgradaj kursoj kaj eventualaj ekzamenoj,

- kulturprogramoj kaj unu tuttaga ekskurso.

Dum la konferenco okazos ekspozicio de lernolibroj, infanliteraturo kaj metodika-pedagogia fakliteraturo, krome: ekspozicio de infandesignaĵoj kun la temo "Esperanto 100-jara". Okazos ankaŭ Internacia Lerneja Semajno por ĉ. 20-30 diversnaciaj lernantoj 12-15-jaraj.

La konferenckotizo enhavas la loĝadon, la manĝadon kaj partoprenon. La dulitaj ĉambroj estas en universitata novkonstruita studenta domo. Loĝejoj, manĝejo kaj kunvenejoj estas tre proksimaj unu de la alia. LKK antaŭvidas buse translokigi konferencanojn al Varsovio tuj post la Konferenco.

Interesuloj sin turnu al Bertil Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 00 Hörby kiu donas pliajn informojn kaj sendas alĝilojn laŭ peto.

Bertil Andreasson

Översättningstävlingen

Under 1985 utlyste SEF:s styrelse en tävling, som gick ut på att översätta esperantolitteratur till svenska. Tre bidrag hade inkommit vid tävlingstidens utgång för ett år sedan, och det är dags att redovisa resultatet.

Först ska sägas, att styrelsen har funnit det svårt att utse någon vinnare. För det första är antalet tävlande alldeles för litet, och för det andra är de insända bidragen av så hög kvalitet, att de svårligen kan bedömas inbördes. Tills vidare redogör vi därför i korthet för de tre bidragen.

1. Signaturen "Gass" har översatt Marjorie Boultons Ne nur leteroj de plumamikoj, som författarinan skrev på uppdrag av SEF och

som utgavs på ESE och med målsättningen, att det skulle bli en bok om esperantos litteratur lämplig att översätta till svenska eller annat etniskt språk, "Gass" skriver till oss, att boken var mycket svåröversatt. Så klart, eftersom M. Boulton är en så framstående esperantoförfattare som tänker på esperanto, när hon skriver esperanto. Hon skulle säkert varit lättare att översätta från engelska.

Beställes per pg 2012-3, SEF.

